## 84-a SAT KONGRESO - 30a Julio - 6a Aŭgusto 2011
### SARAJEVO - Bosnio kaj Hercegovino

Por pliaj informoj, kiam haveblaj, kontaktu la peranton (vidu paĝon 14) aŭ vizitu <http://www.sat-esperanto.org>.

Ĉefa kontakt-adreso: 84-a SAT-KONGRESO,Pf. 452 Kralja Tvrtka 19,
BA-71000 SARAJEVO, Bosnio kaj Hercegovino, satkongreso@esperanto.ba
Telefono: +387 33 205 487, Telefakso: +387 33 205 487, www.esperanto.ba
programkontribuantoj: satprogramo@esperanto.ba
fetah.zvirac@energoinvest.com, senad.colic@esperanto.ba

Prezidanto de OKK: Fetah Zvirac

| **Kongreskotizoj (€)** Ĝis: | 31 Dec. | 28 Feb | 30 Apr | 30 Jun. | Pli poste |
|---|---|---|---|---|---|
| SAT-membro | 40 | 45 | 50 | 55 | 60 |
| SAT-geedzoj(se ambaŭ) | 60 | 70 | 80 | 85 | 90 |
| SAT-junuloj ĝis 25 j. | 15 | 20 | 25 | 30 | 35 |
| Nemembro | 50 | 55 | 60 | 65 | 70 |
| Junula nemembro | 20 | 25 | 30 | 35 | 40 |

- Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon
* La partoprenantoj el CZ, EE, HU, LT, LV, PL kaj SK ĝuas 30% rabaton.
* La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI), kaj eksa SU (krom EE, LT kaj LV) kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50% rabaton.
* Kongresaneco ne transdoneblas al alia persono.
* La kotizo ne inkluzivas manĝadon kaj loĝadon, ekskursojn kaj aliajn aparte pagendajn aferojn, ankaŭ nenian asekuron.
* La kotizo ne estas repagebla senkonsidere pro kia kaŭzo la aliĝinto ne povas partopreni la kongreson.
* Aliĝilon sen pago de kotizo kaj prezo de unu tranokto OKK ne traktos

**ATENTU: Tiuj, kiuj bezonas enirvizon al Bosnio kaj Hercegovino, bonvolu mem akiri ĝin. OKK povas sendi nur invitleteron post la ricevo de la pasportnumero sur la aliĝilo. Al nealiĝantoj OKK ne sendas invitleteron.**
Kongresejo: anoncota
Limdato por peti invitleteron estas la 1-an de julio 2011

### ***84th SAT Congress 2011***

*These congresses are one of SAT's main activities, combining AGM activites with plenty of opportunities to hear about and discuss progressive issues and with some tourism as well. The participants will come from many different parts of the world, so the programme will be in Esperanto only, the working language of SAT. Also the volunteer organisers can only deal with their local language and Esperanto. For practical reasons, a sufficient knowledge of Esperanto is required by all those not accompanied by an Esperantist.*



**Gazeto de Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio**

# La Verda Proleto

**Journal of Workers' Esperanto Movement (SATEB)**

Numero 434 ~~~ Septembro 2010

## DEKLARACIO - 83-a SAT-Kongreso

La 83-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunvenanta en Braŝovo de la 1-a ĝis 6-a de aŭgusto 2010, substrekas, ke ĝia statuto instigas la membrojn de SAT agadi sur diversaj terenoj. Ĉi jare, la kongresa temo estis “Ekonomia krizo k ties plurflankaj efikoj”. La kongresanoj de SAT, gastigitaj de la frata loka asocio Amikeco Braŝovo, debatis interalie pri sindikatoj en nuna Rumanio, rekta aktivismo en Koreio, rumana kulturo, rasismo, laborista movado en la 20a jarcento, esperantismo, ekonomia krizo.

La Kongreso

- kontentas, ke la konvencio de Oslo aplikiĝas de la 1-a de aŭgusto 2010 al ĉiuj ratifintaj ŝtatoj. Bedaŭrinde, 70 ŝtatoj subskribis sed ankoraŭ ne ratifis ĝin,
- skribis al la ambasadoroj de Ĉinio, Finnlando, Hindio, Israelo, Pakistano, Rusio kaj Usono, en Rumanio por peti, ke tiuj landoj subskribu k ratifu la Konvencion de Otavo, kiu malpermesas ĉiujn kontraŭpersonajn minojn. De kvin jaroj, ĉiujare, SAT efektivigis, ĉe la ambasadoroj de antaŭcititaj landoj, la saman agon en la lando, kie okazis ĝia kongreso. Ankaŭ ĉi tiun jaron SAT petis, en letero, ke tiuj landoj subskribu k ratifu la Konvencion de Oslo, kiu malpermesas iujn pafaĵoĵetojn el bomboj,
- kontentas, ke Rumanio subskribis k ratifis la Konvencion de Otavo. Tamen la Kongreso skribis al la rumana ĉefministro por peti, ke Rumanio subskribu k ratifu la Konvencion de Oslo. La letero rememorigas al la ĉefministro, ke la pafaĵoj, ĵetitaj el bomboj aŭ obusoj, neeksploditaj dum la ekfrapo sur grundon, fariĝas fakte kontraŭpersonaj minoj,
- denuncas la financajn instituiciojn situantajn en la landoj ratifintaj la Konvencion de Oslo, kiuj investas eksterlande en fabrikoj de pafaĵoĵetoj el bomboj. Ĝi petas, en la landoj ratifintaj la Konvencion de Oslo, kontrolon de la registaroj ĉe la financaj institucioj por postuli la ĉesigon de aktivecoj, kiujn la internacia juro malpermesas,

(daŭrigo p. 5)

### ***DECLARATION - 83rd SAT Congress***

*- an English translation appears on page 4*

# * S.A.T.E.B *

## WORKERS' ESPERANTO MOVEMENT


Prezidanto / *Chairperson* Ed Robertson 52 Easter Drylaw View, Edinburgh EH4 2QP
Tel: 0131 3329808 <ed-robertson@teleosvet.co.uk>

Sekretario / *Secretary*: David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzow, Carluke ML8 4QT
Tel: 01555 759166 <davidekelso@yahoo.co.uk>

Kasisto / *Treasurer* Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex CM13 1EJ Tel: 01277 228962 <arturo@signalprent.demon.co.uk>

**La Verda Proleto** Redaktoro / *Editor* Laura Miller, 68 Etherly Rd, LONDON N15 3AL
Tel: 020 8800 5120 <lauramiller1216@hotmail.com>



**Pri la enhavo de kontribuaĵoj respondecas nur la aŭtoroj mem.**
***Views expressed by contributors are the responsibility of the authors alone***


## KOTIZOJ / *SUBSCRIPTIONS*

**La SATEB-kotizo por 2010 estis pagenda en januaro.**
**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj pagi.**
***The SATEB subscription for 2010 was due in January.***
***If you haven't yet paid please do so now***
Detaloj kaj formularo je paĝo 13 / *Details and form on page 13*

**La SAT-kotizo por 2011 pagendis en januaro**
**Bonvolu pagi akurate** (Detaloj kaj formularo je paĝo 14)**.**

### LVP-kopioj en la Biblioteko Butler

Geoffrey King serĉas jenajn mankantajn ekzemplerojn: De la fino de 1998 ĝis n-ro 414. Tiam 415, 416, kaj 425. Se vi havas bonkvalitajn ekzemplerojn, bonvolu kontakti lin ĉe EAB.

**DANKON -** Ni daŭre dankas al Paul Gubbins pro lia zorga kontrolado de LVP.
**THANK-YOU** - We are always thankful to Paul Gubbins for his conscientious checking of LVP

**LVP 435** Kontribuaĵoj invitataj - limdato 31-an de decembro 2010
*Contributions are invited - to reach us by 31st December 2010*

## *What Zamenhof said about workers*

*"Probably for nobody in the world has our democratic language more importance than for workers and I hope that sooner or later they will become the strongest support of our cause. Not only do the workers understand the utility of Esperanto, but they more than others feel the essence and ideas of Esperantism."*



# 84-a SAT KONGRESO

**Sarajevo:**

- la ĉefurbo de la ŝtato Bosnio kaj Hercegovino
- la urbo de KULTURO, kie renkontiĝas la Oriento kaj la Okcidento
- la urbo de RELIGIO, kie kunekzistadas je distanco de nur cent metroj ĉefpreĝejoj de kvar grandaj mondaj religioj – "la eŭropa Jerusalemo"
- la urbo de moderna eŭropa HISTORIO, en kiu la atenco en 1914 komencigis la unuan mondmiliton kaj la sieĝo en 1995 finis tragikan flankon de la 20-a jarcento
- la urbo de TURISMO kun multaj vizitindaj monumentoj, tre pitoreska malnova urbo kaj la bela ĉirkaŭaĵo.

***84th SAT Congress 2011*** *See footnote on next page.*

**Ĉerpaĵoj el la per-reta SAT-diskuto** -SAT agadu por homaj rajtoj de ciganoj

Laŭ ĵurnalo la franca registaro komencis forekzili ciganojn, sendante 800 ciganojn aŭ nomadojn al Romanio kaj Bulgario. Tio estas politiko de diskriminacio laŭ raso kaj denasko. Mi ege bedaŭras, ke la franca registaro ne povas kompreni alian vivmanieron ol tio de kutimaj francoj.

Mi respektas la universalajn valorojn, kiuj devenas de la revolucia tradicio de franca popolo, sed mi pensas, ke tiuj ne ekskluzivas vivmanieron de nomadoj, kiuj loĝas en Francio laŭ alia kutimo de vivmaniero. Fakte en Parizo, oni trovas posŝtelistajn grupojn de junaj ciganoj, bedaŭrinde. Sed la problemo estas de la malriĉeco de ciganoj, kaj la registaro devas agi por altigi ilian vivan nivelon.

Ankaŭ la itala registaro celas forigi ciganojn de la urbo de Romo. La registaro de la urbo Beogrado trude foririgas 300 ciganajn familiojn de la urbo por konstrui aŭtovojojn. La eŭropaj registaroj traktas ciganojn kiel sovaĝhundojn. La registaroj devas ĉesi trudan foririgon, kaj komenci interkonsiliĝon kun ciganoj. Se ili postulasla la foriron de ciganojn, ili devas prepari noktejojn por ciganoj.

Kiel vi pensas? amike **Tetu**

Antaŭ kelkaj jaroj mi jam estis proponinta la temon "la ciganoj en eŭropo". (ĝi certe meritas artikolojn en S-ulo).
La cigana popolo senteritoria estas la plej graanda minoritato en Eŭropo.
En Svislando ekzistas 35mil ciganoj. Oni persekutas ilin same kiel en aliaj eŭropaj lando.
Kvankam aŭtoktona popolo ĝi tute ne estas konsiderata de registaro sed ĉiamaniere ĉikanata.
En mia urbeto ekzistas domo, kie loĝas ciganoj. ruĝ- gefrate **d rooke**

................ (la diskuto daŭras) ..................

# Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT

Tutmonda forumoj, rektaj kontaktoj - per tiuj SAT celas antaŭenigi informadon kaj interkomprenon inter laboristoj kaj progresemuloj, por helpi forigi maljustecon ktp.
SAT uzas la racie elpensitan lingvon **- Esperanto -** por atingi siajn celojn.
*Worldwide forums, direct contacts - by these S.A.T. aims to promote knowledge and understanding amongst workers and progressives to help overcome injustice etc. - using the rational language* ***Esperanto*** *to achieve its aims.*

La demokrata strukturo de SAT estas inter-membra, ne inter-'nacia'.
*SAT's democratic structure is based on members, not on national boundaries.*
*Note that the worldwide nature of SAT means that only Esperantists may join.*

SAT kongresas ĉiujare en diversaj mondo-partoj, "Sennaciulo" aperas preskaŭ ĉiumonate, "Sennacieca Revuo" (literatura revuo) aperas jare. Adresaro (regule ĝisdatigita) ebligas rektajn kontaktojn inter la anoj. SAT eldonas librojn kaj broŝurojn kongrue al la celoj, kaj laŭnecese vortarojn, aliajn librojn, ktp.

**Membro-kotizo: £45**. Membroj ricevas "Sennaciulo"-n, "Sennacieca Revuo"-n, kaj adresaron, kaj rajtas pagi rabatan kongres-kotizojn.
(Minimume £23 por tiuj kiuj vere ne kapablas pagi la plenan kotizon)
**Dumviva membreco** nun havebla **- £1125 -** rabato ne haveblas.
Nemembroj rajtas aboni al "Sennaciulo" kun "Sennacieca Revuo" kontraŭ £50. Sendu monon (se en britaj pundoj) al la peranto, ne al SAT.

Oficejo: SAT, 67 Ave Gambetta, F-75020 Paris, France. Retadreso: <satesperanto@free.fr> TTTpaĝo:<http://www.sat-esperanto.org>

**Uzu la suban formularon por informpetoj kaj pagoj por Britio**, kaj sendu al la peranto: Arturo Prent, 7 Walton Gdns, Hutton, Brentwood, Essex, CM13 1EJ (Ĉekoj pagendaj al "SAT") Retadreso: arturo@signalprent.demon.co.uk

*tranĉu* >- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

***Sendu al la peranto (vidu supre)***

☐ Bonvolu sendi pli da informo pri SAT ☐ Bonvolu sendi aliĝdeklaron ☐ Bonvolu sendi informon kaj aliĝilon por la SAT-Kongreso

☐ Realiĝo / abono Dato ______________

Nomo ______________________________

Adreso ______________________________

______________________________

(nedevigaj)-> tel: ______________________________

retadreso: ______________________________

☐ Marku, se ni rajtas sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

Mi kunsendas:- kotizon £_______+ donacon*£________sume:- £_________

per ĉeko/poŝtmandato/______________ (ĉekoj al "SAT.")

*celo por donaco__________________________________



# SATEB-JARKUNVENO 2010 / *AGM 2010*

La jarkunsido de SATEB okazos je 14.00h, la 23-an de oktobro, ĉe:
*The SATEB AGM will be held at 2.00 pm, 23 October, at:*

**Wedgwood Memorial College** Station Rd Barlaston Stoke-on-Trent ST12 9DG

## TAGORDO / *AGENDA*

1. Enkonduko / *Introduction*
2. Pardonpetoj / *Apologies*
3. Protokolo de la pasinta jarkunsido / *Minutes of the previous AGM*
4. Raporto de la komitato / *Committee report*
5. Kasraporto / *Treasurer's report*
6. Membraro / *Membership*
7. La Verda Proleto
8. SAT
9. Estonteco de SATEB (sube) / *Future of SATEB (below)*
10. Baloto / *Elections*
11. Aliaj aferoj / *AOB*

La kunveno okazos per Esperanto / *The meeting will be in Esperanto*

Propono de la komitato: **"Ĉi tiu kunveno suspendas la laŭstatutan funkciadon de SATEB kaj transdonas la havaĵon al Kuratora Komisiono elektota de ĉi tiu kunveno, ĝis reaktivado de la asocio. La Kuratora Komisiono devos voki ĝeneralan kunvenon por aŭ revivigi aŭ malfondi la asocion. "**

La kunsido okazos kadre de semajnfina 'Diskutrondo' (Drondo) sed ĉiuj membroj rajtas veni nur por la jarkunveno. Se vi volos manĝi aŭ tranokti ĉe la altlernejo Wedgwood, necesas aranĝi tion tra Esperanto-Domo (vidu sube). Se vi ne jam aliĝis, kaj aliĝilo por Drondo ne troviĝas kun LVP, bv peti de Esperanto-Domo (sube). Se, pro spacomanko en la altlernejo Wedgwood, necesos loĝi ekstere je pli alta kosto (por simila komforto), SATEB pretas pagi la diferencon.

*The AGM will take place as part of a Discussion Weekend* (Drondo) *but members are entitled to come for the AGM only. If you do come only for the AGM, but want to have a meal, or stay overnight, please contact Esperanto House (see below). If you haven't already enrolled for Drondo and there isn't a leaflet/application form with this LVP, please contact Esperanto House. If, through lack of space in the college, you have to stay outside at greater cost (for similar facilities), SATEB is prepared to pay the difference.*

**EAB** (Viv O'Dunne, Administrator), Esperanto House, Station Rd, **Barlaston**, Stoke-on-Trent ST12 9DE. tel.: 0845 230 1887 eab@esperanto-gb.org

## *DECLARATION - 83rd SAT Congress*

*The 83rd SAT Congress, meeting in Brasov from the 1st to the 6th August 2010, emphasises that its statute encourages SAT members to be active in various areas. This year the congress theme was "The Ecomomic Crisis and its many sided effects". The SAT congress participants, hosted by the fraternal local association "Friendliness Brazov" debated, amoungst other things, trade unions in Romania, direct action in Korea, Romanian culture, racism, the labour movement in the 20th century, Esperantism, the economic crisis.*

*The Congress:*

- *is pleased that the Oslo Convention applies from the 1st August 2010 to all the states that ratified it. Unfortunately 70 states have signed but not ratified it,*
- *wrote to the Rumanian ambassadors of China, Finnland, India, Israel, Pakistan, Russia and the USA to ask those countries to sign and ratify the Ottawa Convention, that prohibits all antipersonnel mines. For the last five years, each year SAT has taken the same action, with the ambassadors of the countries concerned, in the country where the congress was held. Also this year, SAT asked, in a letter, that those countries sign and ratify the Oslo Convention, that prohibits any cluster munitions,*
- *is pleased that Romania has signed and ratified the Ottawa Convention. However, the Congress wrote to the Romanian prime minister to ask Romania to sign and ratify the Oslo Convention. The letter reminds the prime minister that bomblet,s ejected from bombs or shells that don't explode on impact, effectively become antipersonnel mines,*
- *denounces the financial institutions situated in the countries that have ratified the Convention of Oslo, that invest abroad in cluster munition factories. It asks, in countries that have ratified the Convention of Oslo, governement checks on financial institutions to insist on their stopping activities prohibited under international law, and supports the efforts of members of our association in their battle to have a world without armaments,*
- *reminds about the rights of all people to live and stay independently and freely in the most suitable place for them, and specifically has solidarity with those expelled for political-economic reasons,*
- *notes that the 25% salary reduction just imposed on Romania comes from the insistence of creditors of countries acting under the IMF, such that it sends especially fraternal greetings to activists demonstrating against the forthcoming meeting of G20 in Seoul in November 2010,*
- *notes that the crisis no longer allows the waged and the capitalists to live together,*

*(continued on page 5)*



# SATEB

## *WORKERS' ESPERANTO MOVEMENT*

Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio celas "diskonigi kaj instrui la internacian lingvon Esperanto kaj antaŭenigi la ideojn de S.A.T."
- celas venigi Esperanton al ĉiuj progresemaj organizoj.
*SATEB - aims "to make known and teach the international language Esperanto, and promote the ideas of SAT."*
*- aims to bring Esperanto to the notice of all progressive organisations.*

Por informo pri SAT bonvolu vidi la venontan paĝon.
*For information about S.A.T. please see the next page.*

SATEB estas sendependa de SAT, sed aktive subtenas ĝin per disvastigo de informoj pri ĝiaj principoj kaj laboro, kaj per organizado de kunvenoj ĉiujaraj.
SATEB *is independent of S.A.T., but actively supports it by spreading information about its principles and work, and by organising yearly meetings.*

**Por pli da informo** bonvolu sendi la suban formularon al la sekretario:
***For further information** please send the form below to the secretary:*
David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT
aŭ **retu** al / *or **email** to*: <arturo@signalprent.demon.co.uk>

Membrokotizo, inkluzive / *Membership, including* : 'La Verda Proleto': £7.00
(tiuj kun malaltaj enspezoj -minimume / *those with low incomes -min.*: £3.00)
(Abono nur por / *Subscription only for* : 'La Verda Proleto': £5.00)

Realiĝoj:- sendu formularon kaj pagon al la kasisto (adreso p. 3)
*Renewals:- send form and payment to treasurer (address on p. 3)*

*cut* > - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - < *tranĉu*

☐ *Information request* Informpeto ☐ *Please send membership form* Bonvolu sendi aliĝilon ☐ *Renewal* Realiĝo

*Name* / Nomo ______________________________

*Address* / Adreso ______________________________

(*optional* / nedeviga) *Phone* / Telefono ______________________________
*email* / retpoŝto ______________________________

*You may send my details to other Esperanto organisations*
Vi rajtas sendi miajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj ☐

*I enclose* / Mi kunsendas : *membership* / kotizon } *subscription* / abonon £________ *donation* / donacon £________

*Date* / dato____________________ *Total /* Sumo: £__________

*cheque/PO/other* _____________ ĉeko/poŝtmandato/alia_____________

*cheques etc. payable to* / ĉekoj ktp. pagendaj al "SATEB"

**LabourStart** (http://www.labourstart.org/eo/)

Kie sindikatanoj komencas sian tagon sur la reto

## Tutmondaj sindikataj novaĵoj

La sindikata ttt-paĝaro prizorgata de Eric Lee daŭre funkcias, sed la esperanta parto lamas. Sube, raporto de Paul Hewitt, parto de raporto de la SAT PK al la membroj. Plej sube, (ripete) la plej lastan artikolon.

### Multlingva sindikata novaĵretejo LabourStart

Bedaurinde la laboro ĉe LabourStart suferis gravan problemon dum la pasintaj monatoj.

Mia fidela kunlaborantino Alwyn Kind mortis antaŭ kelkaj monatoj kaj nun mankas al ni fidela esperantisto, kiu kapablas akurate traduki/resumi artikoletojn.

Alwyn fidele tradukis minimume tri artikoletojn ĉiusemajne dum jaroj (eble pli ol 10). Mi mem ne volas aŭ eĉ ne kompetentas agi kiel redaktoro. Mi nur elektas la artikolojn el LabourStart kaj sendas ilin al la tradukistoj. Ili devas rapide respondi kaj akurate resendi tradukaĵojn sen eraroj ktp.

LabourStart uzas diversajn lingvojn kaj la tradukisto povus mem elekti la artikolojn de LabourStart aŭ aliaj fontoj. La artikoloj devas esti pri sindikataj aferoj ne pri ĝeneralaj politikaj aferoj.

Pro kopirajtaj leĝoj ni ne rajtas traduki artikolojn rekte do vere la tradukaĵo devas esti resumado de artikoloj.

Bonvolu noti, ke mi kelkfoje ricevis mesaĝojn de volontuloj sed mi trovis ke ofte ili vere ne kapablas senerare traduki.

**Paul Hewitt**

**Post la morto de Alwyn Kind, mankas kompetenta tradukisto.** Paul faras kio eblas, sed se vi opinias, ke vi povos helpi, aŭ konas iun, kiu eble povos, bonvolu kontakti: **Paul Hewitt kv9999e50ster@googlemail.com**. Se ne estas granda risko, ke Labourstart ne plu havos Esperantajn paĝojn.

Intertempe, ni tre dankas al Paul Hewitt pro liaj ĝisnunaj laboroj.

### Italio: Distriktaj juĝistoj strikis pro kalumnioj - 02-Feb-2010

En Italio distriktaj juĝistoj strikis ĉe la semajnfino proteste kontraŭ atakoj de ĉefministro Silvio Berlusconi.

Gvidanto de la nacia sindikato por juĝistoj Gioacchino Natoli diris, ke s-ro Berlusconi karakterizis juĝistojn kiel 'ekzekutistojn, komunistojn, kloakaĵon kaj kanceron.'

'Jen kelkajn vortoj, kiujn la ĉefministro kaj liaj deputitoj uzis por karakterizi nin, kaj ni strikas, ĉar ni ne volas esti daŭre la celo de ĉi tiu agreso,' li diris.

*(Labourstart is a web site for trade union news. It has reports in Esperanto as well as many other languages.)*



## DEKLARACIO - 83-a SAT kongreso (konkludo)

- subtenas la klopodojn de gek-doj el nia asocio en iliaj luktoj havi mondon sen armiloj,
- rememorigas la rajton de ĉiuj homoj memstare kaj libere vivi kaj loĝi tie, kie estas al ili plej taŭge, kaj aparte solidaras kun ĉiuj pro politik-ekonomiaj kialoj forpelitoj,
- konstatas, ke la 25%-aj salajromalaltigoj ĵus truditaj al Rumanio venas de la postuloj de la kreditoroj de la landoj, kiuj agadas kadre de IMF; tial ĝi sendas aparte fratecan saluton al aktivuloj, kiuj manifestacios kontraŭ la venonta kunveno de G20 en Seulo en novembro 2010,
- konstatas, ke la krizo ne plu ebligas kunvivadon inter salajruloj kaj kapitalistoj,
- interesiĝas pri la ĉi jare starigata Banko Eŭropa Etika (BEE) per kunfando de tri nunaj etikaj bankoj (Banca Popolare Etica el Italio, NEF el Francio kaj FIARE el Hispanio), konsiderante, ke tiu banko verŝajne agos per pli etikaj rimedoj ol aliaj bankoj, k aprobas la proponon, ke SAT tien deponu parton el sia mono,
- subtenas kunlaborojn inter SAT k aliaj frataj esperanto-asocioj kiel MAS (Monda Asembleo Socia) k IFEF (Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj) por projektoj, pri kiuj pluraj asocioj havas intereson komune agadi,
- substrekas la gravecon de la malfacilaĵoj i.a. estigitaj de naciismo kaj kapitalismo, kiujn regule frontas homoj kaj celas klerigajn interŝanĝojn de ĉiuj homoj por antaŭenigi nian komunan emancipiĝon.

## *DECLARATION - 83rd SAT Congress (conclusion)*

- *is interested in the setting-up this year of the European Ethical bank (BEE) out of three existing ethical banks (Banca Popolare Etica in Italy, NEF in France and FIARE in Spain), supposing that this bank probably uses more ethical resources than other banks, and approves the proposal that SAT deposits some of its maney there,*
- *supports collaboration between SAT and other sister Esperanto associations such as MAS (World Social Assembly) and IFEF (International Railwaymen's Esperanto Federation) in projects for which several associations have an interest in communal activity,*
- *emphasises the importance of the difficulties caused, among other things, by nationalism and capitalism, regularly faced by people, and has aims of cultural/educational exchanges between everyone to advance our communal emancipation.*

## Koalicie - aŭ kolapse ?

La tradicia balotsistemo en Britio estas bizara, kvankam iusence efika. Tutsimple, la kandidato, kiu gajnas plej multajn voĉojn, venkas. Teorie, se estus dek kandidatoj kaj ĉiuj gajnus pli-malpli saman nombron da voĉoj, la venkinto povus elektiĝi per 10.001% de la voĉoj. Tia sistem favoras grandajn partiojn, malfavoras malgrandajn, precipe se tutlandajn. Teorie, partio povus gajni 25% el la totalo da voĉoj kaj gajni eĉ ne unu seĝon en la parlamento.

Kompreneble, la grandaj partioj - la konservativuloj kaj la laboristoj - ĝis nun subtenas tian sistemon, dum la malgrandaj - liberaldemokratoj, verduloj kaj aliaj - feroce atakas ĝin. En la tutlanda baloto en majo 2010, neniu partio gajnis entutan plimulton da seĝoj en la parlamento, do necesis ia konkordo inter du partioj por munti plimulton. Eventuale, la plej sukcesa partio, la Konservativa, faris akordon kun la Liberal-Demokratoj kaj estigis la unuan koalician registaron en Britio depost 1945.

Ĉu eventuale tiu koalicio pretervivos? La konservativuloj estas dekstrema partio, kvankam la partiestro (nun ĉefministro, David Cameron) kredeble iom pli centrisma ol la plimulto el la partio. La 'libdemoj' estas maldekstrema partio, kvankam la partiestro (nun vic-ĉefministro, Nick Clegg) kaj aliaj ĉefuloj en la partio (nun ministroj en la koalicia registaro) kredeble iom pli centrismaj ol la cetera partio. Tiuj gvidantoj, do, sukcesis interkonsenti pri registara programo por la koalicio - precipe pri la giganta buĝet-deficito, kiu rezultis de la financa krizo kaj ties sekvoj. Iliaj partianoj, tamen, la dekstremaj konservativuloj kaj la maldekstremaj libdemoj, iom malpli entuziasmas.

Fortaj streĉoj atendas. Iamaniere, tiu 'koala' registaro devas elhaki pli ol kvinonon de la totala registara elspezo: apenaŭ oni povas imagi la sekvojn, kaj la reagon de la brita popolo. En majo 2011 okazos (supozante konsenton de la parlamento) referendumo pri la balotsistemo: la konservativuloj plejparte oponos la proponotan sistemon, dum la libdemoj tion subtenos. Pli ĝenerale, la libdemoj estas la 'maldekstra' alo de la registaro, la konservativuloj la 'dekstra', sed ne ene de unu partio, regata de ties disciplino kaj interesoj. Ne, temas pri du apartaj partioj, jam dum du jarcentoj akraj rivaloj.

La Laborista Partio rajtas rideti. Ĉi-jare ĝi elektas novan partiestron, kiu povos distancigi sin de la faroj de la eksa registaro kaj samtempe insisti, ke la buĝeta buĉado de la koalicio ne necesas kaj misefikos je la ekonomio. Tre facile la laboristoj povos subteni ĉiujn ajn protestojn kontraŭ la monŝparaj politikoj de la koalo.

Entute, ŝajnas al mi neimageble, ke tiu registaro pretervivu kvin jarojn. Se la koalicio disiĝos, necesos plua baloto, en kiu la laboristoj nepre gajnos, eĉ se ne tute venkos. Kaj la libdemoj - ĉu ili travivos la kunvivadon kun la malamiko ?

(daŭrigo p. 10)



popularа METEOLOGIO - t.e. la SCIENCO pri la VETERO. La ĉiutagaj celoj de tiu scienco estas VETERPROGNOZOJ, per kiu oni planas siajn tagojn - ekz., ĉu pikniki aŭ ne pikniki? Ĉar pikniko meze de PLUVO aŭ NEĜO aŭ ŜTORMO - aŭ eĉ nur sub malhelaj NUBOJ - estus nedezirebla renkontiĝo. Efektive, je malgranda skalo, ĝi estus KATASTROFO. Sed hodiaŭ okazas katastrofoj, je grandegaj skaloj, tra la mondo. Homoj dronas sub INUNDOJ kaj URAGANOJ ĉe marbordoj. Aliaj pereas pro TERTREMOJ kaj VULKANERUPCIOJ enlande. Eĉ TEMPERATURO en si mem kaŭzas mortojn, dank' al tro da FROSTEGO aŭ tro da VARMEGO. Tio okazis tra la historio kaj prahistorio, sed hodiaŭ METEOLOGOJ hipotezas, teorias kaj prognozas pri TERGLOBA VARMIGO: Daŭra procezo kaŭzata de homa POLUADO DE LA MEDIO, dank' al HIPERINDUSTRIO kaj ties ELFLUAJ VENENOJ en la ATMOSFERON, en la GRUNDON kaj en la MONDAKVOJN. Kaj, kompreneble, ankaŭ en nin kaj en la NUTROĈENON ĝenerale. Sed ree al la vetero … ju pli da tio, des pli da malbona vetero. Agnoskite - pli varma tago fojfoje ŝajnas donaco el la ĈIELO; sed la finfina efiko, laŭ la meteologoj, estas katastrofa kaj NERENVERSEBLA malplibonigo de la vetero. Kion do fari? Respondo: Lernu pri la nuntempa vetero, pri ties kaŭzoj - kaj strebu STABILIGI kaj RENVERSI la hodiaŭajn tendencojn, antaŭ ol nia bonŝanco elĉerpiĝos.

### *WHITHER THE WEATHER?*

*There's a saying: 'Whosoever would control the weather, would control the world.' Well, it would appear that the world's weather today is out of control. At the same time, it makes sense to study the weather - if only to have some understanding of the profound changes underway. So let's take a look at some basic vocabulary items of popular METEOROLOGY (i.e., the SCIENCE of WEATHER). The everyday objective of that science is WEATHER FORECASTS, by which we all plan our days. For instance: To picnic or not to picnic? After all, a picnic in the middle of some RAIN, or SNOW, or a STORM, or even under the cover of dark CLOUDS, would be an undesirable gathering. Indeed, on a modest scale, it would be something of a CATASTROPHE. Nowadays, however, catastrophes of a truly grand scale are occuring around the world. People are drowned in FLOODS and HURRICANCES by the seaside. Others perish by way of EARTHQUAKES and VOLCANIC ERUPTIONS farther inland. Just TEMPERATURE alone is causing deaths, thanks to EXTREME COLD or EXTREME HEAT. That has happened throughout history and prehistory, but today METEOROLOGISTS hypothesise, theorise, and predict in terms of GLOBAL WARMING: An ongoing process caused by human POLLUTION OF THE ENVIRONMENT, as a result of INTENSE INDUSTRIALISATION and the flow of its TOXIC END-PRODUCTS into the ATMOSPHERE, the SOIL, and the WORLD'S WATERS. And, of course, into us - and into the FOOD CHAIN in general. But getting back to the weather … the more this happens, the worse the weather. Okay - from time to time a warmer day seems like a gift from the SKIES; but the ultimate result, according to the weather specialists, is a catastrophic and IRREVERSIBLE worsening of the weather. So what should we do? Answer: Learn about latter-day weather and its causes. And strive to STABILISE and REVERSE its current tendencies - before our luck runs out.*

***David Thornell***

## Koalicie - aŭ kolapse? (konkludo)

Ege dubinde. Kiam la eksa Liberala Partio lastfoje partoprenis koalicion (krom la dummilita), tiun de Ramsay MacDonald, la partio krevis en du frakciojn, la 'Nacia', kiu fine unuiĝis kun la konservativuloj, kaj la sendependa, kiu ŝrumpis ĝis nur kvin deputitoj en la 50-aj jaroj.

Ĉu io simila morgaŭe ? Ĉu la Laborista Partio kapablos enfaldi la libdemajn ribelojn, kreante novan 'Partion de la Maldekstro'?

**David Kelso**

## ConDem'd to Failure ? (conclusion)

And the LibDems - will they survive their supper with the Devil? Very doubtful. When the Liberal Party (as was) last joined a coalition (not counting the wartime all-party government), that of Ramsay MacDonald, the party split in two: the NatLibs who eventually disappeared into the Tory Party, and the non-coalitionists, who eventually shrank to only five MPs in the 1950s.

Could something similar happen again? Is the Labour Party capable of enfolding the 'rebels', thus creating a new, broad 'Party of the Left'?

**David Kelso**

## Leteroj (konkludo)

Mi ne volas rerakonti la argumentojn por 'Kuratora Komisiono' kiujn mi plene klarigis, plurfoje, en LVP. Estas nur propono: se la membraro ne volas akcepti tian proponon, nu punkto, fino. Kaj se iuj volas fari alie, kial diable ili ne jam faris dum lastaj jaroj?? Mi faras tiun proponon nur ĉar neniu proponas alternative, kaj ĉar nenio okazis en SATEB jam dum pluraj jaroj.. Se, estontece, iuj volos reaktivigi la asocion, ĉiuj informoj plene haveblos tra SAT, de kiu ni estas (kaj daŭre estus) subtena asocio. Ankaŭ, mi esperas, ke LVP daŭre aperos, kaj per tiu estontaj entuziasmuloj ekscios pri SATEB.

Pri sindikata agado, socialismo2010, la Socialisma Partio, CPGB, Weekly Worker kaj tiaj plu … nu, se vi volas agadi en tiuj rondoj, nepre faru! Mi esperas, ke vi konscias, ke SAT estas malferma komunumo, en kiu partoprenas progresemuloj el ĉiaj tendencoj kaj ismoj? Mi dankas vin, kaj gratulas, pro via viva intereso pri SATEB. Mi plezure atendas la rerenkontiĝon ĉe la jarkunveno, kie estos abunda okazo por pli diskuti tiujn demandojn.

Kamaradajn bondezirojn -

**David** (Sekretario de SATEB sed ĉi-okaze persone parolanta)

## LINGVA ANGULO

### KIEN LA VETERO?

Onidiro: 'Kiu regus la veteron, regus la mondon.' Nu, ŝajnas, ke monda vetero nuntempe estas ekster ies regado. Tamen, estus saĝe studi la veteron, eĉ se nur por iom kompreni la profundajn ŝanĝojn ĉirkaŭ ni. Ni do rigardu iujn bazajn vortojn de



## ConDem'd to Failure?

Britain's traditional electoral system is rather odd, although it kind-of works. In essence - the candidate who gets most votes, wins. In theory, if there were ten candidates, all more or less equally popular, then one could win with just 10.001% of the votes ! Such a system favours big parties and disadvantages smaller parties. In theory, a national party could receive 25% of all the votes cast, yet win not a single seat in parliament, if its votes were evenly spread across the country.

Not surprisingly, the bigger parties - the Conservatives (Tories) and Labour - have until now supported such a system, while the smaller parties - Liberal Democrats (LibDems), Greens and others - have bitterly attacked it. In the election in May 2010, no party won an overall majority of seats, so some sort of deal between two parties was necessary to achieve a majority. In the event, the most successful party, the Tories, did a deal with the LibDems and formed the first coalition government since 1945.

But will this coalition actually survive ? The Tories are a right-of-centre party, although the leader (now prime minister), David Cameron, is probably more centrist than most of the party. the LibDems are a left-of-centre party, although their leader (Nick Clegg, now deputy PM) and other leading figures (now government ministers) are probably more centrist than most of the party. These leaders have therefore been able to agree a government programme for the coalition - especially regarding the huge budget deficit created by the financial crisis and its aftermath. Their followers, however, the rightist Tories and leftist LibDems, are rather less enthusiastic.

Difficult times lie ahead. Somehow or other, this 'ConDem' government has to cut more than a fifth of total government expenditure: it's hard to imagine the consequences, and the reaction of the British people. In May 2011 there is to be a referendum (assuming parliamentary approval) on the electoral system: the Tories, for the most part, will oppose the proposed changes, while the LibDems will support the change. More generally, the LibDems are the 'left wing' of the coalition, the Tories the 'right wing', but not within one party, subject to the discipline and the political interests of that party. No, we're talking about two distinct parties, bitter rivals for two centuries.

Well may the Labour Party smile. This year they elect a new leader, who will be able to distance her/himself from the deeds of the previous government and at the same time insist that the government's budget cuts are unnecessarily severe, and harmful to the economy. All too easily, the Labour Party will be able to support any and all protests against the cuts by the ConDem'd coalition.

All in all, I find it inconceivable that this government could survive for five years. If the coalition collapses, fresh elections will be necessary, in which the Labour Party must make major gains, even if they don't win outright.

*(continued on page 10)*

## Leteroj

Lastatempe okazis interesa interŝanĝo de leteroj inter nia membro, Peter Redfarn, kaj David Kelso. Eble la enhavo interesos legantojn - kaj stimulos reagon ?

Kara David,

Dankon pro via letero kaj bv pardoni malfruan respondon. Pri via demando, kial mi ne unue ricevis "La Verda Proleto", mi tute ne scias. Se anstataŭe mi recevis ian strangan eldonaĵon, nomitan kiel "La Volapuka Komunisto", mi scius kiun kulpigi, sed ne! Ĉekon, kiun mi sendis poŝte al Cubana Flugvojo ne riceviĝis, sed mi ricevis ŝumendon el the Foot Shop tuj. Kiel vi scias, mi partoprenadas en "Drondoj", kaj opinias ilin plimulte bone. Tamen. mi ne opinias taŭge, ke SATEBa jarkunveno estu vosto de alia kunveno ĉe Barlastono. Pli grava ol ideologia sendependenco estas kosto, por io, kio pretendas esti proleta organizo.

Kelkfoje mi ĉeestas kunvenojn de tia organizo, kiel "Communication Workers Broad Left" kaj "National Shop Stewards Network". Tiaj kunvenoj aranĝiĝas tiel, ke oni ne bezonas tranokti. Eĉ pli grave estas via propono "suspendi la statutan funkciadon" de SATEB. Leginte vian artikolon, kaj en Esperanto kaj en la angla multfoje, mi ankoraŭ ne tute klariĝas pri kio vi proponas, kaj kial. Kiujn povojn havus "la kuratora komisiono?" Se tia komisiono "prizorgas la havaĵon", kiel mono haveblos al membraro por agado? Vi diris "anstataŭ por la burokratio". Laŭ mi "burokratio" estas malhelpo de agado. Ĉu vi konfesas malhelpi tiel? Kiu decidos ke novaj energiaj SATanoj alvenis? Ĉu kuratora komisiono? Ĉu tiu komisiono povos entombigi SATEBon eterne? Kiel membroj motiviĝos anigi, se la asocio ne plu funkcias? Kial via propono malsukcesis dum la 2007a jarkunveno, se la komitato subtenis ĝin, kaj nur du nekomitatanoj ĉeestis? Nun estas la plej maltaŭga tempo por forlasi la celojn de SAT. En Britio, alianco da milionuloj fortranĉas ciujn publikajn servojn.

Metodoj uzitaj de Esperantistoj ĝis nun ne plu taŭgas. Oni povas lasi informon en biblioteko, sed bibliotekoj fermiĝas. Oni povas peti al magistrato, ke Esperanto uziĝu en lernejo, sed la registraro volas forigi lernejojn el loka demokrata reagado. (La sola "servo" libera el tranĉilo estas armiloj de amas-detruado [Trident]. Nu, mi ne scias, kiun David Cameron volas murdi, sed se li volas murdi min, la sento estas reciproka!)

La artikolo de Laura Miller en LVP ekzempligis tion, kio pli kaj pli okazas. Lokaj kampanjoj formiĝas kontraŭ tranĉoj al publikaj servoj. Ja en mia distrikto la fako pri urĝaj kazoj en la loka hospitalo saviĝis pro tia kampanjo, en kiu mi partoprenas, precipe tiukaze kun emeritoj anstataŭ sindikatistoj. Nun kampanjistoj kuniĝas, loke kaj eĉ nacie.



La striko ĉe Lindseya naftrafinejo elmontris, kiom unu-du homoj, kun volo kaj kuraĝo, povas atingi. La entreprenisto anstataŭigis ĝiajn laboristojn de malmultkostaj italoj, laŭ EUa leĝo. Ĝi loĝigis la italojn en barĝo. Unue, la anstataŭigitaj laboristoj frapfrazadis "Britaj postenoj por britaj laboristoj". Tio allogis la mediojn, ankaŭ BNPon, kiu tamen forpeliĝis. La sindikata komitato ne scias kion fari, kaj eksiĝis. Tamen kamerado el Socialisma Partio laboris tie. Li kontaktis sian regionan organizanton. Aliaj konstruistoj informiĝis. Kun helpo de la novega kaj tre malgranda itala sekcio, flugfolio en la itala produktiĝis. Resulto: laboro partiĝis inter britoj kaj italoj kun laŭsindikata salajro. Venko!

Tio elmontris la fakon de Esperantistoj en nuna klasbatalo. Ni havas lingvon, kaj aliron al aliaj lingvoj. La politiko de la registaro favoras enmigrigon el EU, kaj malfavoras enmigrigon el ekster ĝi. Tio estas parte rasismo, sed ankaŭ estas ĉar la eŭropanoj eble malpli parolas la anglan. (Enoch Powell varbis antilanojn kiel malmultekosta laboro, sed kiam tiuj enmigrantoj partoprenis sindikatojn li uzis rasismon.). Enmigrantoj estos speciala celo por la malbonfaro de la registraro. Ĝenerale, pro historia kaŭzo, en tiel-nomita "ekssocialisma" parto de la EU (krom Germanio), la maldekstrema movado estas iom malpli forta ol la Eo movado, do eble ni havas taskon.

Mi faru proponon. Socialism 2010 socialism2010.net okazos 6an kaj 7an novembron en Londono. La programo estas preskaŭ plena, sed eble oni povos enpremigi debaton pri Esperanto tie, (Bedaŭrinde, la Komunisma Partio (CPGB/Weekly Worker), kiu enhavas esperantistojn, havas reputacion pri sektemismo.) Maltrankvile sed ne malespere.-

**Peter Redfarn**

…………………………………………………………………………….

Kara Peter -

Mi ne vere komprenas, kiel tiuj demandoj rilatas al esper-brit, de kio mi ne estas listano, sed se vi volos plukopii tiun respondon, mi ne protestus. Ĉu vi scias, ke SATEB havas sian propran diskutliston? - http://groups.yahoo.com/group/SATEB/ - kvankam mi konfesu, ke ĝi ne multe aktivas.

Mi gratulu vin pro la nivelo de via lingvoscio; mi devas konfesi ke, el niaj interŝanĝoj en Drondo kaj aliokaze, mi ne konstatis, ke vi tiom bone regas la lingvon. Aŭ eble iu helpis tiurilate? Leginte vian leteron, mi tuj pensis, ke vi devus verki artikolo/jn por La Verda Proleto, kiu konstante bonvenigas kontribuojn de membroj aliaj ol la 'kutimaj'.

Pri la jarkunveno: ĉu vi ne rimarkis en la anoncoj, ke oni rajtas ĉeesti nur la jarkunvenon, senpage kaj sen partopreno en la semajnfino? La simpla fakto estas, ke pli da membroj ĉeestis pasintjare en Barlastono ol en Londono, kiam la jarkunveno okazis memstare.